

29-an de Junio 1925
16h.

Doŝlo 4/7/25

¹ *marĝena noto de la skribinto*

Kara Amiko + Poeto mia.

Vi diras ke ekzistas momentoj en vivo kiam oni sentas ke oni estas deviga respondi tuj. Por mi, tiu momento ekzistas nun. Mi sentas ke mi devas respondi tuj. Mi ŝuldas tion al vi. Kompreneble, tiuj momentoj ne povas esti ĉiam, ĉar tiel, ni pasigus la vivon skribi + tio ne povus esti. Sed, tiun fojon, estas alie. Post ricevo + legado de vortoj viaj tiel bele verkitaj mi devas tuj skribi + danki.

Ŝajnis ke ju pli vi prokrastas, des pli bele vi skribas. Ĉu la prokrasto + la atendo pli fortigus, pli beligus la amikecon?

Vi finas vian belan poezion je tiuj vortoj: ho, leteroj, amikeco, k.t.p. kial vi estas avaraj? Sed, ĉu vi ne scias kial? Ĉu vi ne scias ke ne estas avareco, sed nur la neebleco daŭri skribadon + amikecon, sola? Se vi estus skribinta pli ofte, vi estus ricevinta¹ pli oftan respondon. Pri l'amikeco, estas alia afero. Manko de leteroj ne malhelpas l'amikecon + se vi ne skribus dum unu jaro,

2

+ vi prezentiĝus ĉe nia pordo, hejmen, ni, L. + mi ricevus vin kiel ĉiaman amikon sen atenti ĉu vi skribis aŭ ne. Pri tio, ni tutkore esperas ricevi vin kiam vi iros Edinburgon. Sed tio estas malproksime + atendente, mi malĝojigas ne vidi vin en Ĝenevo. Sed, tio ne miras min, mi antaŭsentis tion. Ni mem ne havas ankoraŭ niajn aliĝojn. La letero kun mono estas preta, sed, mi atendas leteron el la agentejo en Parizo antaŭ ol sendi ĝin. Ni faris la kalkulon + mi opinias ke la 2-a prezo estas iom alta + mi kredas ke estus pli bone elekti si mem sian hotelon. Mi konas Privat + mi estis en lia 2-a Kongreso + bone scias tion kion oni (aŭ li) donas por la mono. Laŭ la programo, tiu Kongreso ne estus tiel agrabla kiel la Wiena: Vespere estas nenio krom la balo + Ginevra (kiun mi vidis en Bern (1913). Oni ne povas sin renkonti en restoracioj ĉar laŭ la biletoj, oni devas manĝi en siaj hoteloj. Feliĉe ke estas en bela lando + mi estos kun Lucien + ne dependas de iu ajn Broder por konduki min ien. Ho! Tiu kongreso en Wien. Mi vere estis malfeliĉa en Wien! Kaj se mi estis 3 povinta rakonti tion al vi, eble vi estus ŝanĝinta l'aferon.

3

Mi vere bedaŭras ke vi ne povas ĉeesti Ĝenevon.

Kiel Esperanto estas bela ligilo! Kiam oni pensas ke de post 1920, mi havas kiel amikon Ĉekon el malgranda, ne konita (por ni) urbeto + mi korespondas (!!) kun li kiel kun amiko de tuta vivo, estas vere strange, bele + sorĉe!

Via lando por mi + por ĉiu franco, estis nekonita + nun ĝi estas tute tute simpatia.

Ho! Kiam mi parolas pri Praha! Kiel entuziasmo! Ĝi estas tiel bela + mi vivis tagojn tiel karajn neforgeseblajn. Kelkafoje, mense, mi revivas ilin + ĉiu detalo estas ankoraŭ freŝa kiel estis hieraŭ.

Atendente, oni maljuniĝis de 4 jaroj. Kiam ni estos tre maljunaj ni reparolos pri tiu kongreso ĉu ne? + eble, de nove, iam estos Kongreso en via lando + mi certe iros se mi povos – se la sano + la valoro de nia malfeliĉa malplialtiĝanta franco permesos.

Pri maljuniĝo, mi tute ne sentas min pli aĝa. Kontraŭe, mi faras pli + "sportas" pli + sentas min pli juna. Kaj ĉiuj diras vi ŝajnas plijuniĝi! Stranga estaĵo, ĉu ne? Kvankam vi ne vivas sammaniere + ne konas miajn kutimojn

¹ Fraŭlino Schulhof skribas al mi kelkafoje. Mi esperas ke la letero ne estas tro peza, diru al mi.

4

duon anglajn + francajn, ofte ŝajnas al mi ke vi komprenas min, ĉu ne? Depost tiom da leteroj ne estus strange ke vi konus min!

Fine, grandan dankon por la tuta enhavo de via letero.

Post kelkaj minutoj mi iros ludi tenison + vespere mi manĝos rapide + iros al la Kasino, en la teatron vidi komedion. Post hodiaŭ ili ludos "opera" + operette. + venos multaj fremduloj. La hoteloj estas nun, ĉiuj, malfermitaj + la marbanoj komenciĝis. Mia edzo prenis 3, antaŭ 2 semajnoj antaŭ la malvarma vetero. Sed hodiaŭ estis peze varme + nune ventego prepariĝas. Kaj mi havas teruran kapdoloron.

Vi sendube revenis hejmen post via Kongreso – mi esperas ke ĝi estis sukcesa. Laŭ D-ro Broder la Pola ne sukcesis pro la Hebreoj. Li fine skribis longan leteron sed nur traktante pri la Hebreoj.

Lucien opinias ke la S-ino en la bildo de la Franca Kongreso similas al mi (Heroldo No 277). Eble, kvankam ŝi estas pli dika.

5

Kaj via ŝakludo? Ĉu vi progresas? Oni devas tiel koncentriĝi en tiu ludo. Mi ludas sed, estas iom longe por mi. Mi ne havas tempon + ofte mi ekrevas + revoj tute ne taŭgas por ŝakludo.

Vi ne estas ankoraŭ urbestro? Tion vi certe estos iam, ĉu ne? La advokatoj estas tiel ofte en la politiko. Mi ŝatus aŭdi vin pledantan (aŭ ĉu estas pledante) . Ĉu vi portas specialan robon? Ŝajnas al mi ke vi jam diris ne.

Aferoj ĉe tie estas tre trankvilaj. Oni ne volas procesi kiam la franko pli + pli malvaloriĝas. La liberaj profesioj estas malbonaj pro la mono – ĉar la vivkosto kvar + kvinobliĝis + advokato povas nur duobligi siajn salajrojn.

1-an de Julio 1925

Mi ne povis daŭri hieraŭ. Mi iris tenisejon kun L. Sed ne povis ludi ĉar la sep "kortoj" estis okupitaj + poste estus estinta tro malfrue por iri Kasinon.

6

Vespere, hieraŭ mi ricevis telegramon de la filo, el Lille, ke li sukcesis en sia 1-a ekz. de Doktoreco en Leĝo-Scienco.

Ni estas, kompreneble, tre ĝojaj ĉar li mankis pli ol 2 monatojn pro skarlateno. Nun, restas ankoraŭ al li 2 ekz. + la "tezo". Li faris, hieraŭ: "la Roma leĝoscienco" + "Pendentos".

Estas belega vetero hodiaŭ. Mi foriras tuj al la "marché" (ĉiu Merkr + Sabato.) kie oni aĉetas ĉion por la manĝado + florojn belegajn. Mi kunprenas ĉiam la "servisteton" kun mi. (knabon) Mi el tiu bela florvendejo aĉetos florojn + mense sendos gerbon da rozoj al vi + al via edzino. Nia ĝardeno nuntempe enhavas multajn rozojn.

Ĝis la revido baldaŭa aŭ ne baldaŭa – kiel vi volas (nur skribe kompreneble, bedaŭrinde). Grandegan dankon por via lasta letero.

Mia parfumo nomiĝas "Azurea" bela nomo ĉu ne?

Tre amikan saluton + samidealan penson

Acie Sergant

Se vi jam havis tiujn fotetojn, senkulpigu min + resendu ilin kiam vi skribos.